



Karaj geamikoj, jen konciza AVENO.

AVE ne estas partio sed kunlaboras kun la Verdaj Movado kaj Partioj; nun ni estas en konkurenco kun 2 Esperanto-Partioj, kun tre simila programo. Pasho post pasho ni konvinkis plurajn Verdajn Partiojn kaj kontinentajn parti-organizajhojn respekti Esperanton kaj ili metis ligon al Esperanto en siaj retejoj - la germana Verda Partio notis Esperanton en sia Europa Programo (2009, p.135).

Sukceso en la politiko dependas ne nur de tauga vizio, sed krome de nombroj da la adeptoj. AVE daurigas sian agadon kaj kunlaboras kun la verdaj partioj kaj kun la eksterparlamentara Verda Movado. Venas Verduloj al la Esperanto-Movado kaj inverse.

#### Venontaj Renkontigoj de AVE-anoj:

2010-11-19/21, Freiburg/Breisgau (DE), AVE informas okaze de la asembleo de la germana Verda Partio. Tie ni havus eblecon renkontighi kun MEP-oj.

2011-07, Kopenhago, UK, AVE-Kunveno

2011-07?, Kievo, IJK, Junaj AVE-anoj: daurigeblo

2011 Dakar, Senegalio, Monda Sociala Forumo, għenerala informo en Eo:

[www.forumsocialmundial.org.br/noticias\\_01.php?cd\\_news=2808&cd\\_language=1](http://www.forumsocialmundial.org.br/noticias_01.php?cd_news=2808&cd_language=1)

Kelkaj **memortagoj**: (pliaj en nia retejo):

Aprilo-26 (de,en,fr,it) [www.Chernobyl-day.org](http://www.Chernobyl-day.org)

Junio 08 **Oceana** Tago

Junio-15 **Ventoenergio**-Tago, [www.globalwindday.de](http://www.globalwindday.de)

Novembro-17: Internacia Tago de Studentoj: memore al **viktimoj de totalitarismaj reghimoj**.

#### Agado:

**2010-09-10/12, Lingvopolitka Semajfino** de GEA, St. Andreasberg (Harcmontaro). Ni perlaboris gvid-liniojn de GEA pri uzado de Eo en Europo. Koncize: uzi la tekston de U. Brocatelli por **EU-himno** kiu għis nun ekzistas nur en formo de muziko (el la 9a simfonio de Beethoven) [www.wix.com/dtislar/europo](http://www.wix.com/dtislar/europo)

kaj subteni la propedeutikan edukadon de Esperanto: [www.springboard2languages.org/home.htm](http://www.springboard2languages.org/home.htm)

[www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm](http://www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm)

Mirejo raportis: **Kunsido de Verduloj dum KAEM** kongreso en Ulan Batoro, Mongolio, Junio 2010. Partoprenantoj el AU,CH,KR,JP,IT,FR,CN,TW,FI,FR.

#### Proponoj por pli efike vivi protektante la medion :

Trinku kranan akvon se eblas; Ŝparu akvon; Manĝu legomojn kaj fruktojn el proksimaj kreskigejoj; Uzu pluvakvon por necesejo aŭ akvumado k.s..

#### Proponoj por pli efike informi, agadi, konvinki:

Serĉo de informoj por pli racie agi: Lobiado; Bojkoto; Manifestacio marŝante & sidante; Muziko kun politika enhavo, kantoj, teatraĵoj; Silenta starado, kun kandeloj; Peticioj; Kunlaboro kun avaaaz. ktp.

#### 2010-07-23 **AVE-Kunveno en Havano, (UK)** okazis:

Temoj: Raportoj pri la verdaj partioj al E-o en diversaj landoj. Alternativaj energioj (vent-, sun-, ondo-energio). Nafto-vershigo en la Meksika Golfo. Ekologio kaj malegaleco, korpa laboro kaj nekorpora laboro, auto kaj biciklo. Ekologio en Havano. Etskalaj projektoj kulturi, paralela għardenkulturado, inter-shangho de servoj. „El la vidpunkto de pli alta ekonomia soci-formacio la privata proprieto de unuopaj individuoj je la terĝlobo aperos tute same absurda kiel la privata proprieto de homo je alia homo. Ech tuta socio, nacio, ja ech chiuj samtempaj socioj kune, ne estas proprieto de la tero. Ili estas nur ghiaj posedantoj, ghiaj uzantoj, kaj ili devas kiel bonaj familiaj patroj postlasi ghin plibonigita al la sekvaj generacioj.” (Karlo Markso, La kapitalo 3)

**"Kien la klimato?** Post Kopenhago kaj Kochabambo. Eseoj" kiu i.a. pritraktas la problemon ke unuflanke necesas shanghi niajn għeneralajn vivmanierojn (i.a. redifino de bezonoj, reduktado de necesaj konsumoj) kaj aliflanke la ekonomia kresko estas esenca viv-kondicho de la kapitalismo, kaj ke do kun ghi la klimato ne saveblas. Entute ch. 50 partoprenanto. Dankon al Vilhelmo Lutermano, aktivas je "Le Monde Diplomatique en Esperanto" [eo.monedidiplo.com](http://eo.monedidiplo.com) kaj Monda Asembleo Socia (MAS) [mas-eo.org](http://mas-eo.org)

#### NRO-oj:

AVE subtenis diversajn retajn helpagadojn:

Peticion por savi Sakineh (kontrau shtonmortigado) - dankon al Reza. (div-aj lingvoj) [freesakineh.org/](http://freesakineh.org/)

La **Usona Leĝo-Instituto (ALI) oficiale retiris la mortopunon** de ĝia Modela Puno-leĝaro pro la multaj mankoj: [www.ncadp.org/](http://www.ncadp.org/)

Peticion de AVAAZ.org al la registaro de Ugando por aboli la leghon kontrau **samseksemuloj**. Ghi minacas per priso kaj ech per mortpuno. [www.avaaz.org](http://www.avaaz.org)

**Tutmonda Etiko:** Fonduso Weltethos, lau Prof-o Hans Kűng, ofertas materialojn por enkonduki tiun ideon en la lernejojn kun la temoj: religioj, ekonomio, politiko, chiutaga kunvivado. (de, en, es, fr) [www.weltethos.org](http://www.weltethos.org) . Kaj same interesa - ech pli malnova organizajho: (de) [www.religionsforpeace.de](http://www.religionsforpeace.de)

La parlamento de la mond-religioj jhus kunsidis en

Melbourne: i.a. parolis indighenoj favore al respekti la mondan klimaton. [www.parliamentofreligions.org/](http://www.parliamentofreligions.org/) kaj simile [www.kairoseuropa.de](http://www.kairoseuropa.de)

Respekti la **Bestajn Rajtojn** en P.R.Chinio: (pluraj lingvoj) [www.ptoa.co.il/petition/index.php](http://www.ptoa.co.il/petition/index.php)

2010-04-13 Invado de **rusa polico** en la oficejon de SEU (Sociala Ekologia Unio) en Samara - "pro krimaj aferoj". Plia indiko ke la belaj vortoj de la nuna prezidento pri libera agado de asocioj ne valoras.

Tago antaue okazis manifestacioj en 44 rusaj urboj kontraŭ la **forhakado pistacho-junipera arbaro** en la naturprotektita zono "Granda Utrish" proksime de la Nigra Maro en la regiono de Krasnodar. [www.seu.ru](http://www.seu.ru)

La pola Verda Partio subtenas la agadon de Greenpeace / Verdpaco Pollando kaj petas subteni la peticion por protekti la grandajn naturparkojn en Pollando: [www.zieloni2004.pl/art-3797.htm](http://www.zieloni2004.pl/art-3797.htm)

Pri la minaco al demokratio pere de la atomenergio trovighas tekstoj sur nia retejo [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org) (je "energio").

**MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO:** evolu-subtena asocio (en, eo, fr) kiu financas kooperativajn projektojn en Afriko: (eo) [www.Globidar.org](http://www.Globidar.org)

**Ekvinokso** : Tago de la Mondcivitanoj - Tago de Monda Unueco (Daniel Durand):[www.recim.org/ascop](http://www.recim.org/ascop)

2010-09-30, Stuttgart, Germanio: Nekredeble brutala polico kontraŭ pacema manifestacio en demokratio. Ili vundis manifestaciantajn lernantojn, k. plenkreskulojn per akvo-pafoj, piprajho kontraŭ la okuloj kaj batoj. Temas pri "**Stuttgart 21**" - ege multekosta subterenigo de la chefa kapo-stacidomo de Stuttgart. [www.parkschuetzer.de/](http://www.parkschuetzer.de/) kaj [www.kopfbahnhof-21.de](http://www.kopfbahnhof-21.de)

**Protekti la Pluvarbaron / kaj pri Bestaj Rajtoj** je ilia bredado: (div-aj) [www.regenwald.org/links.php?rub=3](http://www.regenwald.org/links.php?rub=3)

Tutmonda E-a **Vegetarana Asocio**: [www.ivu.org/teva](http://www.ivu.org/teva)

Filmetoj, Prelegoj - en Esperanto pri **klimato**: [www.ted.com/talks/lang/eng/al\\_gore\\_warns\\_on\\_latest\\_climate\\_trends.html](http://www.ted.com/talks/lang/eng/al_gore_warns_on_latest_climate_trends.html) kaj **vegetara manghado**: [/graham\\_hill\\_weekday\\_vegetarian.html](http://graham_hill_weekday_vegetarian.html) (Iau Leo)

2000-2010 estas la Jardeko de UN por Paco kaj Senperforto. [www.alvoko-al-mondpaco.org/](http://www.alvoko-al-mondpaco.org/) (Mirejo) Senperforta solvado da konfliktoj: [www.wfga.de/](http://www.wfga.de/)

**Festivalo de la Tero - Ekologio, Paco, Solidareco** [www.festivaldelaterre.org/index\\_esperanto.htm](http://www.festivaldelaterre.org/index_esperanto.htm)

**Uranio ekspluatado minacas indighenajn popolojn:** [www.nuclear-risks.org/](http://www.nuclear-risks.org/)

2010-08-07, **Lofoten/Vesteralen**, Norvegio: la ekologia movado **protestis kontraŭ la en-mara nafto-ekspluatado** en la regiono. Verduloj: [www.mdg.no](http://www.mdg.no)

**Evolu-helpaj projektoj de esperantistoj en Afriko:** [www.esp-evoluo.tk/](http://www.esp-evoluo.tk/) kaj [www.kono.be/mazingira/](http://www.kono.be/mazingira/)

Okazis **grandaj manifestacioj kontraŭ la atom-**

**reaktoroj** omaghe al Chernobil je Neckarwestheim, Biblis, Hamburgo. [www.campact.de/atom2/kette/biblis](http://www.campact.de/atom2/kette/biblis)

Ronaldo mencias por **kampanjoj**: [\\_groups.yahoo.com/group/retaj-kampanjoj-por-esperanto](http://_groups.yahoo.com/group/retaj-kampanjoj-por-esperanto)

Okazis voĉdono en la retejo de la usona organizajho Change.org (propono de Renata Ventura) pri enkonduki Esperanton kiel dua lingvo en la usonaj lernejoj:

[www.change.org/ideas/view/obama\\_introduce\\_esperanto\\_as\\_a\\_foreign\\_language\\_subject\\_in\\_schools](http://www.change.org/ideas/view/obama_introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools)

## ALVOKO AL MONDPACO

La civila socio devas movi la mondon. "Vi devas esti la shangho, kiun vi volas vidi en la mondo !" (Gandhi) Bv iri al retejo [www.alvoko-al-mondpaco.org](http://www.alvoko-al-mondpaco.org) kaj pri-pensi pri chiu pasho. Mirejo Grosjean, CH-2416 Les Brenets, mirejo.mireille che [gmail.com](mailto:mireille@gmail.com)

Opinio de AVE: Militistoj almenau devas respekti la civilulojn - jen nur unu el la malbonaj agoj (bombado de benzin-kamionoj kiam mortis pli ol cent homoj - parte civiluloj) Germanio montris ne nur fanatike stultan sed fakte kruelan kunlaborem kun Usono por neniigi fanatikulojn, t.n. Taleban (Koran-studentoj). Necesus subteni pozitivajn strukturojn en tiaj landoj, kiuj plibonigus la viv-situacion de la homoj. Nur tiel ebligas redukti la mortigan fanatizmon. Ankaŭ en Afriko milicistoj terorigas civilulojn, ech infanojn kaj uzas seksan perforton por humiligi la popolojn.

## Europa Sociala Forumo (ESF) Istanbul ?

Organizajho: <judith.dellheim@web.de> Iau Andrzej

Junio 2010 Kopenhago: Velo Global City: Granda renkontigho de biciklo-uzantoj, **bickilado & urba-planado**) okazis [www.bikeleague.org/](http://www.bikeleague.org/) (de Neil)

**UNIFEM** estas la stablo de UN por virinoj, klopodas subteni la virinojn chie en la mondo kaj luktas por iliaj rajtoj kaj plibonigi la vivkondichojn. [www.unifem.org](http://www.unifem.org)

**Israelaj oficiroj estis punitaj** pro bombado kun fosforaj brulbomboj dum la Gaza-Milito, 2009 al domo de UN-helporganizajho por rifughintoj. Tio kontrauas la militleghon. (Iau Ha'aretz & taz 2010-02-02, p.10)

2010-03 **La kazo Jukos** antau la Europa Kortumo pri Homaj Rajtoj: [www.yukos-echr-claim.com/](http://www.yukos-echr-claim.com/)

**Kontraŭ mortpuno kaj por Esperanto en Usono:** [change.org/ideas/view/abolish\\_the\\_death\\_penalty\\_education.change.org/actions/view/help\\_solve\\_the\\_worlds\\_language\\_problem](http://change.org/ideas/view/abolish_the_death_penalty_education.change.org/actions/view/help_solve_the_worlds_language_problem)

---

## Ekologio:

"100 Bonaj **Argumentoj kontraŭ la Atomenergio**" (eo, de EWS) sur [www.verduloj.org/energio.htm](http://www.verduloj.org/energio.htm)

La **sudafrika** registaro finfine ĉesis la projekton de novtipa **atomreaktoro**, kiu uzas stakon da kugloj: Temas pri teknologio kiun germanoj ne sukcesis (aŭ ne plu volis) fini. La foruzita monsumo sufiĉus instali almenaŭ 500.000 suno-akvovarmigilojn.

[www.mg.co.za/article/2010-09-17-sa-mothballs-pebble-bed-modular-reactor-project](http://www.mg.co.za/article/2010-09-17-sa-mothballs-pebble-bed-modular-reactor-project) (lau H.v.Blottnitz)

Okazis **pola & germana Anti-Atomenergia Tendaro** (2010-05-21/23) en Mescherin (Odro) kontraŭ la planita atomcentralo je Gryfino (PL), sude de Szczecin: [www.aflum.de](http://www.aflum.de) (lau Ute & Kaie Haas) [www.zieloni2004.pl/news.htm](http://www.zieloni2004.pl/news.htm) (Dank' al Pawel)

Shajnas ke **Ukrainio** planas 6 novajn reaktorojn, dum duona Europo ankoraŭ suferas je la radiado eksportita el Chernobil. Ukrainio kun la granda areo povus produkti sufiĉe da biomaso, suna kaj ventoenergio.

**Litovio** malhaltis la malnovan reaktoron Ignalina, sed **Rusio** planas novan je la landlimo: Balta NPP.

Protesti kontraŭ nova giganta **barlago en Amazonio** (pt) [www.internationalrivers.org/en/xingu](http://www.internationalrivers.org/en/xingu)

**Tero-Politiko**, por daurigebla estonteco: L.R. Brown, Plan B 4.0 [www.earth-policy.org](http://www.earth-policy.org) (eo je SAT)

**Sudameriko - malvarmo:** - homoj kaj bestoj frostmortis: klimata efiko - El Ninjo/La Ninja ?

**Arkto - varmo:** glacheroj (en Grenlando) kaj glaciigta marsurfaco pli rapide degelas.

**Klimato:** [mas-eo.org/article.php3?id\\_article=396](http://mas-eo.org/article.php3?id_article=396)

**Reciklado & Edukado:** (en) [www.earth911.com](http://www.earth911.com)

**Virtuala Akvo:** kiom da akvo oni bezonas por produkt kotonon, fragojn, viandon, benzinon, metalojn, uranion ktp. Meza Europo k.a. rabas akvon el regionoj kie ghi jam mankas - ekz-e el Uzbekio, kie ĉefe la kotono neniigis la sudan parton de la ARAL-mar. (de): [www.natur.de](http://www.natur.de) - serchu "Wasser"

La **Ekologia NRO en Uzbekio** nun havas sidon en la parlamento - dank' al la prezidento. [www.eco.uz](http://www.eco.uz)

**Botelakvo:** [www.youtube.com/user/EsperantoParolita](http://www.youtube.com/user/EsperantoParolita)

**Kaj** [www.filterforgood.com/blog/?p=3027](http://www.filterforgood.com/blog/?p=3027)

2010-08-22: **Tago de Tutmonda Trouzado por la jaro 2010:** Jen vi povas kalkuli vian "piedspuron" lau via vivkondicho. (de, en, es, ft, it) [www.footprintnetwork.org/en/index.php/GFN/](http://www.footprintnetwork.org/en/index.php/GFN/)

**"4a Revolucio"** - redukti la dependecon de energio-importoj: (en,de) [www.energyautonomy.org](http://www.energyautonomy.org)

Monda Solidareco kontraŭ la **Malsato:** [globidar.org](http://globidar.org)

Slovakia registaro volas vendi naturprotektejojn por konstruado de domoj en la Tatra Nacia Parko. [www.ekoforum.sk/peticia/stop-destruction-tatra-eo](http://www.ekoforum.sk/peticia/stop-destruction-tatra-eo)

Pakistano - inundo: unu kauzo certe estas la plivarmigo de la oceanoj, kiu produktas pli da vaporo. La Himalajo pluvigas la nubojn. Do la homfarita kauzo estas la forceja efiko de niaj diversaj ellasgasoj (CO<sub>2</sub>, metano, N<sub>2</sub>O). Sed Pakistano forhakas la arbarojn - kaj necesas rearbarigi. (Ruth Pfau, [www.DAHW.de](http://www.DAHW.de)) **Inundoj ghenerale:** Necesas pli sagha politiko rilate la setligo, urbo-ampleksigo, lasado de naturaj inundo-areoj povus redukti la amplekson de la katastrofo.

**Rusio - varmego+sekeco+X= brulantaj regionoj** Homfaritaj kauzoj por la grandareaj fajroj estas ke 2002 Rusio (sub Putin) neniigis la regionan forst-mastrumadon de respondeculoj; kaj subsurface brulas multaj sekigitaj torfejoj por uzi la terenon por agrikulturo; necesas re-akvumi ilin.

Per **bicikla mondvojaĝo** Alice kaj Cedric fotis multajn notindajhojn (en Esperanto dank' al Ginette) [picasaweb.google.fr/portraitdeplanete](http://picasaweb.google.fr/portraitdeplanete)

**UN okaze de la Monda Oceana Tago:**

... Dum sciencistoj esploras la oceanojn je ĉiam pli profundaj niveloj ol iam ajn antaŭe, ili daŭre eltrovas novajn formojn de mara vivo... Sed troa ekspluatado de mare vivantaj rimedoj, klimata ŝanĝiĝo, kaj polucio pro danĝeraj materialoj kaj agadoj prezentas gravan minacon al la mara ĉirkaŭaĵo. Tion faras ankaŭ la kresko de krimaj agadoj\*, inkluzive de piratado, kiuj havas gravajn implicojn je la sendanĝereco de navigado kaj la sekureco de maristoj.

La Konvencio de UN pri la Juro de la Maro (1982) daŭre rolas kiel nia gvidilo. Sed se ni volas sekurigi la kapablon de la oceanoj servi la abundajn kaj variajn bezonojn de la socio, necesas fari multon pli. Okaze de tiu ĉi Tago, mi petas registarojn kaj civitanojn ĉie, ke ili faru sian parton por garantii la sanon kaj vivant-econ de la maroj. (lau traduko de Humphrey Tonkin)

**\*2010 Usono:** Nafto ekspluatado kausas katastrofojn: Golfo de Meksiko (BP), amazonio (Chevron); same la ekspluatado au prilaborado de oro kaj aluminio.

---

**Verdaj Partioj:**

Vic-Prezidento de la Ruanda Demokrata Verda Partio, **Andre Kagwa Rwisereka, estis kruele mortigita.** [rwandagreendemocrats.org/spip.php?article83](http://rwandagreendemocrats.org/spip.php?article83)

**Brazilo:** Ekologiistino **Marina Silva** (52, Verda Partio) gajnis 20% por la prezidenteco. Promesis puran regadon kaj daŭrigeblan evoluon kaj batali kontraŭ socia maljusteco kaj korupto. Naskiĝis en familio de kaŭĉuko kolektantoj kunlaboris kun la Chico Mendes. Silva, kiu 2008 ekis de sia posteno ministro pri la medio ĉar ŝi fariĝis ĉiam pli izolita kiam Prezidento Lula da Silva-a subtenis biofuelon, genetike modifitajn organismojn kaj atomenergian.

**Dalai Lamao agnoskis ke la Verda Partio** en Usono estas la partio de senperforto, ekologio, homaj rajtoj kaj liberoj, kaj bazaj valoroj de sociala justeco kaj ekonomia justeco. [www.gp.org](http://www.gp.org)

**Albana 'Verda Partio** esprimis la solidarecon kaj doni sian subtenon al la Membroj de la Albano Parlamento kaj ankaŭ al aliaj civitanoj, kiuj komencis malsatstrikon favore al demokratio kaj libero je voĉdona elektado.

**Irlando:** La Ministro pri medio promesis instali pli ol 50 lokojn dediĉitaj por la protekto de vivejo (habitato) kaj la faŭno. John Gormley, la Prezidento de la Verda Partio diris ankaŭ ke li baldaŭ rivelos kiel la lando difinas la Internacian Biologian Diverseco-Semajnon.

Informojn pri la **Finna atom-reaktora** situacio, de Satu Hassi: Novaj atomreaktoroj ne bezonatas por

hejmlanda elektro-konsumo, kiu signifas ke la reaktoroj estus konstruitaj por elektro-eksporto: [www.henriettamediat.fi/galleria/fin\\_gr.html](http://www.henriettamediat.fi/galleria/fin_gr.html)

Verda Partio en **Grekio** / Oikologoi Prasinoi volas: Malakcepti la mekanismon de la Eŭrozono-IMF Subtenadon - pro ekologia minacado. Insisti al alternativoj surbaze de la Giegold Raporto adoptita de la Eŭropa Parlamento. Forlasi la malsukcesan politikon, kiel vetarmado, faraonaj projektoj, kaj la "facila mono" heredaĵo sekve de la 2004 Olimpikaj Ludoj .

La Verda Partio en la **germana** provinco **Nordrejn-Vestfalia** ricevis duoble da voĉoj; nun kunregadas kun SPD por sekvi pli ekologian ekonomion.

**Caroline Lucas**, eksa MEP, prezidanto de la Verda Partio en Anglio kaj Kimrio, ighis la unua rekte elektita membro de la Verda Partio en la Parlamento de UK.

Eco.uz ricevis laŭ ordono de la prezidento 15 seĝojn kiel la **ekologia frakcio** en la parlamento de **Uzbekio**.

**Aziaj-Pacifikaj Verdaj Partioj:** [www.greenparty.org.tw](http://www.greenparty.org.tw)

**Kontrau eskalado de milito en Afghanio:** Verdulo Hans-Christian Stroebele, Berlino estas kontrau tiu militara engaghigho, kaj postulas de la registaro tuj haltigi la ofensivajn agrosojn de la NATO, por eviti plian eskaladon de la milito. Laŭ la ISAF-mandato, armiloj estas uzendaj nur en kazo de rekta atako kontrau la soldatoj au kontrau civiluloj. Plimulto de la germana populacio kontrauas tiun engaghighon. (de) [www.stroebele-online.de](http://www.stroebele-online.de)

#### **Agado por lingvaj rajtoj & Esperanto & Verduloj:**

Tatjana Zhdanoka estas membro de EP en la frakcio de Verduloj/Regionalistoj (Greens/EFA) - ŝi kunverkis libron pri la problemoj de rus-devenaj homoj en Latvio. [www.lingvaj-rajtoj.org/](http://www.lingvaj-rajtoj.org/) & [www.pctvl.lv/index.php?lang=en&mode=opinion&page\\_id=262](http://www.pctvl.lv/index.php?lang=en&mode=opinion&page_id=262)

2010-09-10712, St. Andreasberg/Harz; **Semajnfino pri Europa laboro.** Maja Tishlar informis pri la realaj eblecoj kaj GEA proponis gvidliniojn por la rolo de Esperanto ene de EU-aj strukturoj. Proponi por la EU-himno (muziko de Beethoven): kanti tekston en Eo laŭ Umberto Brocatelli: [europo@esperanto.de](mailto:europo@esperanto.de)

**Franca Verda Partio uzas Esperanton:** [aquitaine.regions-europe-ecologie.fr/signez-l-appel/2066-ekologio-konkeru-akvitanion/](http://aquitaine.regions-europe-ecologie.fr/signez-l-appel/2066-ekologio-konkeru-akvitanion/) & [lesverts.fr/article.php3?id\\_article=645](http://lesverts.fr/article.php3?id_article=645)

**Germana Verda Partio** postulis respekti minoritatajn lingvojn kaj la neutralan internacian lingvon Esperanto en sia programo pri Europo.

En diskutlibro "grün 2020" trovighas sprita eseo de Britta Loose pri "Esperanto en Europo en 2020" en la germana. La germanaj junaj Verduloj sinprezantas en Esperanto kaj prezentas Esperanton: [www.gruene-jugend.de/aktuelles/111036.html](http://www.gruene-jugend.de/aktuelles/111036.html) [www.gruene-jugend.de/nachrichten/98888.html](http://www.gruene-jugend.de/nachrichten/98888.html)

2010-05-23, Kaiserslautern: **AVE diskutis pri la EU-Agado** (okaze de kuna kongresoj de GEA kaj UFE): 1. chiam proponi la propedeutikan valoron de Esperanto: [springboard2languages.org/home.htm](http://springboard2languages.org/home.htm)

2. La Europa Junulara Parlamento ghis nun ne akceptas Esperanton. Julia kontaktadas la respondeculojn por trovi kio eblos estonte. Cem Oezdemir, vira parolanto de la germanaj Verduloj, patrono por la EJP en Aprilo, respondis ke li ne kontrauas la ideon, sed mem ne rajtas decidi. Necesas diskuti kun ilia konsilio.

**Per Gahrton**, iama MEP de la **svedaj Verduloj**, ne neglektas Esperanton. Eble iu povas diskuti kun li en kadre de lia Pens-Tanko: [www.cogito.nu](http://www.cogito.nu)

**Junuloj de AVE** (DE, FI, PL) kontaktis FYEG/FJEV (Federacio de la Junaj Europaj Verduloj) por akcepti la tradukon de la ĝenerala politika teksto de FJEV sur ilia retejo. La sekretario jam respondis pozitive - pro shangho de la retejo povas daŭri ankoraŭ iom da tempo. Chiukaze tiu teksto jam estas legebla sur nia retejo: [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org) (maldekstra kolono, ...)

Aparte interesa estus por AVE ekscii kiom da niaj membroj estas junaj verdpartianoj (ghis la 30a jaro).

Ni jam scias pri tiaj en Finnlando, Germanio kaj Pollando. Se en via lando ne ekzistas verda partio - bonvolu tamen respondi. Se vi estas juna (ankau se ne plu juna) - kaj ankoraŭ ne membro de verda partio - bonvolu pripensi la membrighon. La akcepto de Esperanto ankau dependas de nia interplektigho en la verdaj partioj.

Verda Europa Fonduso: ili subtenas la diskutadon kaj perlaboron de novaj ideoj chirkau: [www.gef.eu/](http://www.gef.eu/)

Esperanto - Linukso de la lingvoj,

Linukso - Esperanto de la komputiloj (vi)

AVE deziras abolicion de: Atomenergio, Mortpuno, Torturo, Diktaturo, Fanatismo. Pli da demokrata partopreno sur chiuj sociaj niveloj. Pli da ekologia respekto kontrau la alia vivantaro.

---

#### **Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE):**

Ĝeneralaj informoj pri AVE trovighas en AVENO 34. Jara Kotizo (propono, inkluzivas Avenon papere ) A-Landanoj kaj "riĉuloj": 5+x EUR, B-Landanoj: 2 EUR Pagenda al nia UEA-Konto: avex-z aŭ letere per monbileteto (EUR, USD, SFR, ...). Prefere transpigi al la nederlanda UEA-poshtkonto: IBAN: NL24PSTB0000378964, BIC: PSTBNL21 notico: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

#### **AVE sekretario:**

Manfred Westermayer  
Kandelstr. 62  
DE-79194 Gundelfingen  
[ave@verduloj.org](mailto:ave@verduloj.org)  
[www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)



AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj  
Ni pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.  
La bazo de nia sukceso: **via kunlaboro.**

Ni preferas koncizan tekston (rtf-formato), cx-ux, ch-u; au NHA ( [pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html](http://pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html) )